

Enkonduko, uzinstrukcioj kaj klarigoj al GVEĈ

Tiu ĉi Granda Vortaro Esperanta-Ĉehxa (GVEĈ) estas prilaborita tabelforme per ĝenerale konata programo "Excel". Tiuj uzantoj de la vortaro, kiuj ne disponas Excelon, povas forpreni el interreto, paĝoj de Microsoft, senpage rigard-programon Microsoft Excel 97 Viewer 95/98/NT. Oni povas uzi ankaŭ adreson <http://www.knet.cz/software/ostatni.htm>. Havi plenan programon Excel tamen estas por la uzanto granda avantaĝo, ĉar li povas la Vortaron diversforme aranĝi, ekzemple alskribadi diversajn notojn, diversforme la vortaron vicigi aŭ per selektado krei siajn fakajn vortarojn laŭ relative riĉa signado de fakoj kaj fariĝi kunlaboranto je la vortaro. La Vortaro nome ne estas ŝirmita kontraŭ kopiado kaj aranĝado. Alilingvaj uzantoj de la vortaro, kiuj volus laŭ GVEĈ krei sialingvan vortaron povas eluzi kolumnojn kun esperantaj vortoj kaj nur anstataŭigadi la ĉeĥajn vortojn kaj tekstojn en sia lingvo.

Por serĉado de la vortoj uzu funkcion "Find" sub rulaĵo "Edit", kiu estas pli rapide alvokebla per klav-kombinaĵo Ctrl-F. Por serĉado de pli frekventaj vortoj estas avantaĝo skribi en la serĉilon antaŭ la Esperanta vorto punkton, ev. antaŭ la ĉeĥa vorto komon ",", eventuale ankoraŭ la samon post la vorto, ekzemple ".vorto." aŭ ",slovo,". La programon vi tiel informos, ke vi interesiĝas nur pri memstaraj vortoj aŭ vortkunligoj, ne pri eventualaj pluaj aperoj de la vorto, ekzemple en kolumnoj por klarigo aŭ por parencaj vortoj. Esperantajn vortojn skribu per literoj laŭ x.konvencio, do anstataŭ ĉ skribu cx, ŝ - sx, ĝ - gx, ĥ - hx, ĵ - jx, ŭ . ux.

En kolumnoj kun esperantaj kaj ĉeĥaj vortoj estas uzita t.n. rompado de la teksto, t.s. ke tuta enhavo de la ĉelo estas videbla, ev. en kelkaj linioj. En aliaj kolumnoj la rompado ne estas uzita. La tuta teksto estas videbla en linio supre. Tio koncernas precipe kolumnojn „vortradiko“, „noto“ kaj „komparu“.

Ĉe kelkaj vortoj estas anstataŭ la ĉeĥa vorto nur signo „#“. Tiel estas en okazoj, kiam la ĉeĥa termino ne ekzistas, aŭ la kompilisto ne konas ĝin. Se temas pri la dua kazo kaj la uzanto konas la ĉeĥan esprimon, la aŭtoro petas lin pri sciigo, por kompletigo de la vortaro.

Post la verbo en Esperanto oni regule aldonas mallongon "t", kiu signifas "transitiva", aŭ "n", "netransitiva", aŭ "tn", transitivecon de la verbo prijuĝu laŭ kunteksto. Verboj kun sufikso "igi" estas ĉiam transitivaj kaj kun sufikso "iĝi" ĉiam netransitivaj.

Sinonimoj de la sama radiko estas metitaj ĉiam en unu ĉelo kaj estas apartigitaj per komoj. Por ebligi amasan dividon de tiaj ĉeloj oni uzas en frazoj, kie estus normala komo, signo „_“.

La vortaro estas provizore destinita prefere por Ĉeĥoj. Pro tio al ĉeĥaj vortoj ne estas prezentataj pliaj gramatikaj datumoj, kiujn la Ĉeĥoj plejparte konas. Pro grandega amplekso de tiuj datoj ne kapablas la kompilinto de la Vortaro aldoni ilin. Eksterlanda uzanto de la Vortaro povas bezonatajn datojn trovi ekzemple en aĉetebla Vortaro por Lernejo kaj Publika. Eble iam en estonteco oni iel kompletigos la Vortaron.

La vokabloj nomitaj en PIV estas signitaj per "p", neologismoj transprenitaj el "Neologisma Glosaro" H. Vatré estas signitaj "nV" kaj proponoj de kompilisto oni signis "n". Mi bonvenos viajn notojn kaj proponojn aparte al tiuj ĉi vortoj.

Superan indeksojn mi anstataŭis per malsuprenstreko "\" kaj per tiu ĉi signo post ĉi vokablo mi indikas, ke temas pri sufikso aŭ ferma parto de kunmetaĵo. Por suprenstreko "/" mi signas prefiksojn aŭ unuajn partojn de la kunmetaĵoj.

Programo Excel ebligas facilan aranĝadon de la Vortaro. Se vi ekzemple decidus kompili Grandan Vortaron Esperantan-alilingvan (-vialingvan) surbaze de GVECx, vi povas tion relative facile fari, ĉar vi povas eluzi kolumnojn kun esperantaj vortoj kaj fari nur ĝiajn tradukojn.

Viajn dezirojn, atentigojn, kompletigojn kaj rekomendojn por plibonigo de la GVECx mi petas sendi al adreso
josefhron1@seznam.cz

Por helpo kaj subteno ĉe kreado de la Vortaro, kunhelpado kaj propono de dokumentaro kaj por diversaj atentigoj mi dankas al esperantistoj Karel Kraft, Miroslav Malovec, Jaroslav Veselý, Ing. Jan Werner, Jarmila Rýznarová, Bernard Eichkorn, MUDr. Josef Hradil, Karel Votoček kaj al pliaj.

Pardubice, Ĉeĥio en decembro 2006

Josef Hron

Klarigoj de faksignoj:

adm	administrativi
anat	anatomio
antr	antropologio
arch	arĥitekturo
archeo	arĥeologio
art	artismo
astr	astronomio
bah	bahaismo
bezobr	senvertebruloj
bibl	biblio
bioch	bioĥemio
biol	biologio
bot	botaniko
budh	budhismo
cit	interjekcio
dipl	diplomatiko
div	teatro
dopr	transporto
ekol	ekologio
ekon	ekonomio
el	elektroteĥniko
ent	entomologio

esp	Esperanto
etn	etnologio
expr	ekspresive
farm	farmakologio
fil	filozofio
film	filmo
fin	financoj
fot	fotografado
fyz	fiziko
fyziol	fiziologio
geod	geodezio
geogr	geografio
geol	geologio
graf	grafiko
gram	gramatiko
herald	heraldiko
hipo	hipologio
hind	hinduismo
hist	historio
horn	minado
hovor	parole
hra	ludoj
hutn	metalurgio
chem	ĥemio
icht	iĥtiologio
isl	islamo
chov	bredado
inf	informadiko
jaz	lingvistiko
jm	nomoj
kniž	libre
kož	ledoj
křest	ĥristanismo
kultov	kultoj
lék	medicino
les	forstofako
let	aviadiko
lit	literaturo
log	logiko
mal	pentrado
mat	matematiko
met	meteorologio
metr	metriko
mikrob	mikrobiologio
min	mineralogio
mysl	ĉasado
myt	mitologio
mytřc	mitologio greka
mytřm	mitologio romana
náb	religio

numizm	numizmatiko
obch	komerco
obuv	ŝuoj
opt	optiko
orn	ornitologio
orn_	sciencaj nomoj de birdoj
paleo	paleontologio
pedol	pedologio
plav	ŝipveturado
pol	politiko
polygr	poligrafio
pošt	poŝto
potr	manĝoj
práv	juro
přenes	figure
psych	psiĥologio
rod	familio
savci	mamuloj
savci_	sciencaj nomoj de mamuloj
soc	komunumo
spoj	telekomunikoj
sport	sporto
stav	konstruado
stroj	maŝinkonstruado
ŝach	ŝakoj
ŝint	ŝintoismo
ŝkol	lernejo
tech	teĥniko
tex	teksaĵoj
uměl	artoj
věd	scienco
vet	veterinarismo
voj	armeo
zem	agrokulturo
zool	zoologio
žel	fervojo